

Theodor Fontane,

Tagmezo

tradukita de Manfredo Ratislavo

La pinoj sonĝas, kaj tiriĝas
nubetoj ĉe l' ĉielo nur;
kvietas tiom, ke aŭdiĝas
la trankvilego de l' natur'.

En suna bril' herbej' malbruas,
kaj mutas arba foliar';
sed sonas, kvazaŭ pluvo fluas
sur la foliojn de l' arbar'.

*Traduko de la Germana poemo "Mittag" de THEODOR FONTANE (Teodoro Fontano, *1819-12-30 – †1898-09-20) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-03-31.*

MR-086-1 / Arg-290-588 (2012-10-06 16:47:15)

Pri la poeto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Theodor_Fontane.